



Parizo, la 22-an de junio 2011

Temo : Fariĝu Ambasadoro de la projekto: « Eŭropo per Teatro »

Sinjorinoj, Sinjoroj, karaj geamikoj,

Al vi ni turnas nin hodiaŭ por kune realigi projekton pri kolektiva eŭropa « eksperimento »: teatra altlernejo akceptanta studentojn po unu el ĉiu lando de Eŭropa Unio. En tia “Babela Turo” kun 27 malsamaj lingvoj, la komunikilo estos Esperanto, progresive instruata dum la unuaj monatoj de la kursaro.

**Dum 10 monatoj,
27 Eŭropanoj el 27 landoj kune vivos kaj laboros,
ligitaj de sama pasio al teatro.**

De dek kvin jaroj Morgaŭ la Printempo aranĝas franc-rusan teatran staĝon en Minsko, kies famo grandiĝas jaron post jaro. Dank'al nia nova projekto, ni esperas alporti nian kontribuon al pliboniĝo de EU, ĉar ni proponas alian vidpunkton pri eŭropa konstruado: kunigi en lernejo studentojn, kiuj elvokos per siaj lingvoj kaj kulturoj la 27 landojn, jen ambicia veto.

Tiu ĉi projekto koncernas eŭropajn gejunulojn, 18 - 30 jarajn kiuj deziras fariĝi profesiaj aktoroj. Komence de la staĝo, ili ne kapablos Esperanton. Krom teatra lernado (50 horojn semajne: kanto, muziko, danco, lukto, skermo, ĵonglado, aktoraj teknikoj, rolludado, improvizado), ankaŭ okazos homa travivado ĉar tiuj gejunuloj vivos kune en **Kastelo Greziljono**, aktiva helpanto de nia projekto: la provludadoj, la propra laboro, la distraĵoj, la komunaj taskoj, ĉiuj aktivadoj okazigos interŝanĝojn, kunajn konstruadojn...

Kaj la projekto distingiĝos per la fakto, ke ĉiuj kursoj okazos en Esperanto. Do necesos lingva instruado planita dum la unuaj monatoj de la kursaro. Tiel lingvoj estos nek baro nek avantaĝo por la staĝanoj: ĉiu povos paŝi al aliulo, justa paŝo por krei veran fratecon... kadre de postulema kaj valora trejnado pri la Teatraj Artoj.

Por ke ekestu tiu ĉi projekto, ni petas vian subtenon: ĝi ja gravas por apogi nian agadon ĉe la eŭropaj organizaĵoj pri helpoj al kulturaj projektoj kaj ĉe eventualaj financ-helpantoj. Ju pli nombraj ni estos, des pli proksima estos nia celo. Do, vi bonvolu disdoni tiun informon ĉirkaŭ vi.

Se vi deziras scii pli, bonvolu viziti nian TTTejon : www.dlptheatre.net

Por elpresi kaj sendi al ni aliĝilon :

http://www.dlptheatre.net/Esperanto/Sercu_ambasadoro_por_la_projekto_teatro_Eo.pdf

Amike kaj frate
Fabris' Kare (Fabrice Carrey) kaj lia teamo



Demain le Printemps / Morgaŭ la Printempo

Association Loi 1901 14, rue de la Tour d'Auvergne 75009 PARIS

Siret: 41382965600052 / Code APE : 913 E

Tel/Fax : +33 1 42 81 33 96 / portable : +33 6 15 19 92 48

www.dlptheatre.net / morgau.la.printempo@gmail.com

Fariĝi Ambasadoro de « Eŭropo per Teatro »

Familia nomo: _____ Persona nomo: _____

Profesio: _____

Adreso: _____

Urbo: _____ Poŝt-kodo: _____

Tel: _____ Poŝtelefono: _____

Retadreso: _____

SOCIETE GENERALE		RELEVÉ D'IDENTITÉ BANCAIRE	
Titulaire du Compte : ASSOCIATION DEMAIN LE PRINTEMPS			
14 RUE DE LA TOUR D'AUVERGNE 75009 PARIS			
Domiciliation		PARIS ST MERRI	(03510)
Identification nationale (RIB)			
30003	03510	00037262959	04
Code Banque	Code Guichet	Numéro de Compte	Clé RIB
Identification internationale (IBAN)			
FR76 30003 03510 00037262959 04			
Identifiant international de la Banque (BIC)			
SOGEFRPP			

Per ĉi tiu letero, mi deziras fariĝi membro de la asocio Morgaŭ la Printempo, pagante jaran kotizon je 15 eŭroj (per banka ĉeko aŭ per ĝiro al "Demain le Printemps").

Kaj mi deziras fariĝi Ambasadoro de la asocio Morgaŭ la Printempo por la realigado de ĝia projekto « Eŭropo per Teatro ». Ĉi-rilate mi pretas plenumi jenajn taskojn:

Bonvolu trastreki ĉelete(j)n pri viaj deziroj...

- Varbi, en mia lando, gelernontojn (tiuj ĉi ne nepre scipovu Esperanton, ĉar la elekta kriterio ĉefe estos la deziro fariĝi aktoro kaj partopreni eŭropan civitanecan projekton)
- Helpi al serĉado, en mia lando, de subvencio por vivkostoj de la lernanto el mia lando.
- Helpi al trovado de loko por la teatra prezentado en mia lando, fine de la trejnado.
- Disdoni ĉirkaŭ mi, laŭ miaj eblecoj, informojn pri la projekto.
- Mi deziras ricevi informojn pri la evoluo de la projekto kaj mi bonvolas enestii la TTTgrupon de Ambasadoroj de la projekto. Mi konsentas ke mia nomo aperu sur la prezenta dosiero de la projekto kaj la retejo Europo-per-Teatro.

Dato kaj subskribo

Demain le Printemps / Morgaŭ la Printempo


Association Loi 1901 14, rue de la Tour d'Auvergne 75009 PARIS

Siret: 41382965600052 / Code APE : 913 E

Tel/Fax : +33 1 42 81 33 96 / portable : +33 6 15 19 92 48

www.dlptheatre.net / morgau.la.printempo@gmail.com





Plej oftaj demandoj...

Kial ne angle... aŭ france aŭ germane?

La angla, la franca, la germana ne estas facile lerneblaj lingvoj. Tamen teatra trejnado postulas altan komprenan nivelon, eĉ se nur pri profunda analizo de teatraĵo. Uzado de komuna lingvo, flue parolata de ĉiuj partoprenantoj, estas nepra kondiĉo de teatra laboro. Pro tio la angla lingvo, evidente larĝe uzata, sed je ne sufiĉa nivelo (amaso el la nombritaj parolantoj kapablas nur "broken english"!) ne taŭgas por tia laboro.

Aliaj lingvoj kiel franca, germana, hispana, ne sufiĉe disvastiĝis en Eŭropa Unio: ilia uzado trudus elekti la studontojn interalie laŭ iliaj lingvaj kapablecoj.

Ĉar la projekto celas kunlaboron de teatropasiuloj el 27 landoj de EU, ne eblas elekti ilin per lingva kriterio. Do Esperanto, kiun eblas rapide ellerni, ŝajnas la sola lingvo vere taŭga por atingi rapide bonan kompren-nivelon. Tiuj kvalitoj montras, ke Esperanto ja taŭgas por dek-monata teatra trejnado.

Ĉu vere oni povas havi bonan Esperantan nivelon post trimonata lernado?

Esperanto estis racie konstruita, laŭ gramatiko kaj laŭ vortriĉeco, tial ĝi tre facile povas esti regata de ĉiuj. Ĝia asimilado baziĝas sur la logiko de ĝia strukturo kaj ne sur parkera lernado de multnombraj esceptoj, kiel okazas en ĉiuj aliaj lingvoj.

Uzadon de Esperanto kiel komuna laborlingvo, oni sukcese provas jam de tri jaroj en turisma lernejo en Pollando, kie studas ĉinaj civitanoj. Ĉar la vortprovizo de Esperanto proksimas la eŭropajn lingvojn, logike, kun junaj eŭropanoj, tia projekto devas funkcii.

En alia lingva kunteksto, kie junaj francparolantoj sekvas teatrajn kursojn samtempe tradukatajn el rusa lingvo, ni ja povas atesti pri la kapableco de tiuj ĉi gelernantoj eklerni la bazojn de la rusa lingvo, kvankam pli malfacila ol Esperanto.

Per nia projekto, kiu kunigos 27 eŭropajn gejunulojn 18 - 30-jarajn, allogitajn de altkvalita teatra trejnado, kies ĉiutaga vivo estos kolektiva, Esperanto, uzata kiel komuna lingvo, tutcerte estos bonega ilo por kultura riĉiĝo de ĉiu.

Kalendaro de la venontaj okazaĵoj:

- | | |
|------------------------|---|
| 2011 / 2012 : | Serĉado de Ambasadoroj en ĉiuj landoj de Eŭropa Unio |
| 2012 septembro : | 1 ^a Kunveno de la Ambasadoroj de la projekto por tiuj kiuj povos vojaĝi.
(en kastelo Greziljono) |
| 2013 septembro: | 2 ^a Kunveno de la Ambasadoroj. (en kastelo Greziljono) |
| 2013 oktobro: | Petado pri monsubteno far <i>Morgaŭ la Printempo</i> . |
| 2013 decembro: | Komenca varbado de gelernantoj en ĉiuj landoj de Eŭropa Unio far la Ambasadoroj de <i>Morgaŭ la Printempo</i> . |
| 2014 majo / junio : | Provizado de la gelernantoj en ĉiu lando de Eŭropa Unio, organizita de la Ambasadoroj. |
| 2014 septembro : | Komenco de la staĝo (10-monata) |
| 2015 julio / aŭgusto : | Eŭropa Turneo por prezenti la staĝfinan spektaklon en la ĉefurboj de E.U. |

Demain le Printemps / Morgaŭ la Printempo

Association Loi 1901 14, rue de la Tour d'Auvergne 75009 PARIS

Siret: 41382965600052 / Code APE : 913 E

Tel/Fax : +33 1 42 81 33 96 / portable : +33 6 15 19 92 48

www.dlptheatre.net / morgau.la.printempo@gmail.com

